

PENSEO

N-ro 358

aŭg. / 2021

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Yohanes Manhitu (Indonezio)



En la spegulo



Mi sopiras paroli vizaĝon kontraŭ vizaĝo al mi mem.

Mi pensas dividi iujn dolorojn kun mi mem.

Mi ne konas alian spacon, krom tiu en la spegulo.

Estas en la spegulo, ke mi eble trovos mian kunparolanton.

Mi staras antaŭ mia mezgranda spegulo rigardante figuron kontraŭ mi, kiu ridetas dum mi ridetas.

Ni ambaŭ parolas samtempe; neniu aŭskultas.

Ni samaspektas, sed neniu el ni estas klonita.

Mi ekkomprenas, ke aferoj ne ĉiam devas esti samaj.

Oni bezonas koni ion aŭ iun alian por kunparoli aŭ dividi dolorojn dumaniere. Paroli enspegule ne estas la sola maniero.

BONVENON AL MIA ANIMO

Ni diru, ke mia animo estas reĝa palaco, kie vi povas ripozi sendube.

Ni diru, ke vi estas atendata vizitanto, kies alveno alportos al mi feliĉon.

Ni diru, ke la tempo estas la gastiganto ĉe la palaco,

kiu gvidos vin vidi ĉi tiun lokon.

La tempo lasos vin preterpasi la pordon.

Miĥail Frolov (Rusio)

ili mortas kiel
defalinta foliara putraĵo
ĉu vi volus esti
parazito kiam tradukas
vi fremdan poemon
sen ritmo
kaj rimoj
baniĝante en sunaj radioj
de l' foraj pensoj
kiuj neniam donu
al vi eĉ ombbron sur asfalto
de homa aprobo
simile al pano malmola?
“kiel vi fartas?” demandis min
unu nigrulo kun vitra okulo
kaj ligna protezo anstataŭ kruro
“kiel vi fartas?”
ili mortas kiel
formikoj dispremitaj
per knaba piedo en
unu tag' de somero
ĉu vi volus esti
knabaĉoj kiuj ŝtelas
berojn de nigra ribo
en najbara ĝarden?
aŭ esti gardisto
kiu celante pafas
al ili pro tiu ĉi beroj
per polmo dispremitaj
kiel nigraj formikoj?
“kiel vi fartas?”
kiel
vi

fartas?



Sirik Slagmu (Francio)



Sen Delirium Tremens

(dediĉita al la Franca Nacia Tago, 14-a de JULIO kaj al la Armena Popolo)

Kion desegnas la ŝtorma kaj nuba horizonto,
Kiel duonvualita okulo rigardanta al portreto,
Kiu havas nenian koloron, nur grizajn

pigmentojn

Kiu finiĝas pere de malseketigitaj bedaŭraj
ploroj.

Ni estas en mondo kun indiferenta menso,
La terura sento disvastiĝas tra la vento,
Neniu volas paki siajn valizojn hodiaŭ,
Estas furioza forpreni la Homaron el sia
vivo ...

En la ondoj de la oceano naskiĝas libereco;
Kiu flirtas sur la surfaco la pensojn pri
vekiĝo,

Sub la brilo de la Suno preparanta por enlitiĝi,
Brilas, tamen l' 'ideo esti novnaskito ...

La ideoj pri libereco sur la Aŭrora ĉaro,
Ondetas milde sed, certe, antaŭeniras,
La Krepusko promesas la buntan tagon,
L' Homaro volas vivi en liberec' kaj sen
perforto!




Terure!

Mi kraĉas sur la vizaĝon de la morta realeco,
Kiu blindigis la homaron nur por iom vivaĉi,
Oni transfiguriĝis la bestojn sen konscienco,
Nur manĝaĉi, dormi kaj plenumi la bezonojn.
Ne ekzistas plu Patrolando, nek naci'valoro,
Nur sin amuzi, kunporti sakon plenan da
mono,

Eĉ se pra-praavoj sin donacis por krei landon,
Nune mi kraĉas sur vizaĝon de terura homaro!

Jadranka Miric (Serbio)



Demandoj kreskas

Post nokto ŝtorma
pli freŝa estas klara tag'
kaj memoro dolĉa pri nokto sendorma
kiel vivi sen via amomag' ?
Foriris vi kun vento aŭtuna.
Ekis tempo mizera sen suna.
Faladis arbfoliar' , reŝanĝis la koloro tiliar'
samkiel kreskis mia amdemandar' .
Tri longaj jaroj sen vi
vagadis mi psike pro vi
longe kun koro ĉagrenita
anime sopirĝeme ekscita.
Mi preĝis, surgenuie kaŭris.
Venis somero kaj ĉio samas.
Birdetoj pepas, griloj ĉirpas,
hundetoj bojas. Nur mia koro vane esperas!

Perfida amo

Bela alloga plaĝo.
Solas mi,
ne gravas aĝo.
Belulinoj svingas mane
salutas mi ilin same.
Rido grandas ĉarma
elkore saluto varma!
Okuloj plenas de beleco
sed koro scias pri fideleco.

En apuda arbustaro
 kaŝis sin juna paro.
 Aŭdiĝas pluvo da kisoj
 kaj miaj alvokoj—telefonmisoj.
 Malgajiĝas mia koro
 pro vi mia oro.
 Ekis somera tag'
 min trafis amosag'.

Someraj agrablajoj

Suno brile salutas nin.
 Gaje birdaro flugas kriaĉante.
 Papilioj tenere tuŝas min.
 dum flugas alten lante!
 Venteton kaŝis varmaj tagoj
 en densaj kaŝtenbranĉoj
 aŭ en bonodora tiliaro
 sub kies ombro ĝuas juna paro.
 Someraj turizmaj ekspozicioj
 dankeme
 allogas nin. Vid al vide bojas hundoj
 post la infano ludanta petoleme
 en malfruaj freŝaj vesperaj horoj.
 Agrablas same la somera vetero
 dum matena freŝa aero.
 Pleniĝas stratoj kun libreraj homoj,
 gaje babillantaj sen maskoj!

Ewo Grochowski (Rusio)



Bildetoj el Kanarioj

Pompas oranĝe
 La birdo paradiza—
 Pepos neniam

La grizaj kruroj
 Promenas elefante—
 La dragonarboj

Nigran plaĝeton
 Du rokejoj brakumas—
 Sed vi tiel for

La paro haltis
 Ĉe la nigra marbordo—
 Ondas la sentoj



Apud Antequera

Domo sur pinto—
 Nur katoj du alkuras
 saluti la gaston

Simpla loĝejo—
 Apud figoj pikantaj
 La tempo haltis

Ventokaresoj,
 Legomoj el sunforno—
 Lia ĉeesto

Olivĝardenoj
 Orde sur la deklivoj—
 Vento en haroj

Novembra suno
 Prilumas blankajn tombojn—
 Pintoj en ombro

Siv Burell (Svedio)



Politikistoj

Vi, kiu plendas pri netaŭgaj politikistoj
 ne kulpigu ilin!
 Estis ja ni, kiuj mem elektis ilin
 kaj poste ĉesis apogi ilin
 nur postulas, ke ili estu superspertistoj.

Tamen ili riskis la civilan karieron,
 sian familian vivadon,

ĉiu havis debaton, kvereladon,
 pridubis homoj la motivadon,
 ili trovis ke ni faris barieron.

Kiel vi havas forton, vi debatantoj?
 Kiu donas al vi kuraĝon kaj fidon
 kaj forton eviti hezitemon,
 aŭ eble ekhavi troan memfidon?
 Laŭdon al vi, la nunaj trabantoj!

La tempo

Tago malaperas
 jaro foriras
 tasko estas finfarita
 pliaj restas.

Pensu pli longe ol por la tago
 havu grandajn perspektivojn!

Se ne sufiĉas la tempo
 pensu, ke troviĝas multaj vivoj.

Elena Popova (Bulgario)



Mara venteto

Varma ventet' silente
 karesojn serĉas.
 Ĝi odoron sentis
 kaj kaŝan sopiron.
 Neatendante
 la ondoj ridante,
 gaje ekkantis
 al ventet' ŝatata
 kaj ĝin ekluletis
 en blua boato.
 – Feliĉa fortuno!... –
 sopiris la dunoj.

Roso

La suno tuŝetis
 la rosgutetojn.

Disverŝis arĝento
 en oron transversis.
 Post tiu tuŝeto
 de l' dolĉaj rosetoj,
 gluto post gluto,
 ne restis guteto.

Matena bildo

La suno ora
 kisojn ne avaras:
 -Kara belul' ludu
 dum la infanjaroj!
 La ĉevaleto
 ruĝiĝas pro ĝojo,
 henas kaj saltetas
 feliĉe survoje.
 La ĉevalin' milde
 frustras: - Gardu vin!
 Belega bildo –
 infano kaj patrin'.

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Kiom da aŭtunoj
 signas kalendaro... Mi
 ne forgesas vin.

En la kameno
 Paliĝas la ardaĵo.
 Paŝoj de cervin'

Ne diru adiaŭ!
 Apenaŭ l'tag' komencas
 ekpezita pro am'

Li! Sola! Taso.
 Mallum' kisas fenestron.
 Falas sensa pluv'


Trans la fenestro
 pala luno kaŝrigardas.
 L'animo ĝemas.

Kamen'. Piano.
En l'ĉambro sonas bluso!
En nokt' blanksaten'

Glaso da kafo,
Nigra pec' da ĉokolad'
Roza aromo!

Korn' sonplenigas
arbaron. Mateniĝas!
Koncert' al birdoj.

Sur la balkono ŝi.
La alajdo kantegas.
Roza estas tag'.



Louis Aragon

La prozo de feliĉo de Elsa

Kio mi estus sen vi, kiu venis renkonte al mi
Kio mi estus sen vi dormanta koro
Ke ĉi tiu horo haltis sur la horloĝo
Kio mi estus sen vi ĉi tiu balbutado?

Mi lernis ĉion de vi pri homaj aferoj
Kaj nun mi vidis la mondon laŭ via maniero
Mi lernis ĉion de vi, kiel ni trinkas ĉe la
fontanoj
Dum ni legas la malproksimajn stelojn sur la
ĉielo
Kiel al la pasanto, kiu kantas, ni rekomencas
lian kanton
Mi lernis ĉion de vi ĝis la sento de la ekscito

Mi lernis ĉion de vi, laŭ mi
Ke tagiĝas tagmeze, ke ĉielo povas esti blua
Tiu feliĉo ne estas gasteja lanterno

Vi prenis min je la mano en ĉi tiu moderna
infero
Kie la homo ne plu scias, kio ĝi estas du
Vi prenis min je la mano kiel feliĉa amanto

Kiu parolas pri feliĉo, ofte havas malĝojaj
okuloj
Ĉu tio ne estas plorado de seniluziigo
Ĉu rompita ŝnuro sub la fingroj de la gitaristo?
Kaj tamen mi diras al vi, ke feliĉo ekzistas
Aliloke ol en la sonĝo, aliloke ol en la nuboj
Lando, tero, jen ĝiaj nekonataj havenoj

Kio mi estus sen vi, kiu venis renkonte al mi
Kio mi estus sen vi dormanta koro
Ke ĉi tiu horo haltis sur la horloĝo
Kio mi estus sen vi ĉi tiu balbutado?

tradukis el la franca



Aksel Voino (Germanio)

Bohdana Jehorova (Ukrainio)



Kontraŭtempo

Estu vi mia rev', mia akvo viviga...
Se ekzistas aferoj en viv'
klare antaŭvideblaj -
Ili certe al vi ne rilatas.
Kaj se menso ekzistas,
nun ĝi dormas kviete,
la okulojn ferminte plej firme,
dezirante nenion kompreni.
Se la koro ekzistas
(kiel kuploorgano de sentoj),
petas ĝi lasi ĉion senŝanĝe;
kaj por ĝi estas bone, kaj mi revas pri amo.
Sed la tempo ekzistas -
super ni ĝi potencon posedas,
aŭ superas ni l' tempon kontraŭe;
ni per forto de flurapideco ĝin dotas.
Memorigas ĝi: revo ne estas eterna,

kaj nek homoj nek vortoj iliaj,
 kaj mi scias, ke pravas ĝi certe,
 sed ne mi bedaŭrinde...
 Estu vi kontraŭtempo por ĉiam.
 Dum la vorto poeme eksplodas -
 jam nenio ekzistas,
 krom la revo pri amo.



Ilustraĵo de Asja Beĵerjanu

Elukrainigis



Petro Palivoda

(Ukrainio)

Mimoza Ahmeti



La soleco

Malplenigita de ĉio
 Nuklea koncepto mi nun estas
 Kun paliĝintaj okuloj
 Kiuj pro la falo brilas.

Ho, malleviĝinta moralo
 Estas tio manko de la humoro
 Kaj ia ajn manko...
 Malplenigite de ĉio,
 La ĉielon mi posedas,
 Maskla ja la ĉielo estas
 De la soleco.

Ho, universa fono
 Naskanta kaj pereiganta pensojn
 Sur la revada kampo...
 De la amanto

Kiun mi ne klopodas alvoki...
 Ĉar io pli granda ol la vivo kaj la
 amo
 La soleco ja estas.
 Ĉi tiuj, ambaŭ, sen ĝi
 Ĉu interkompreniĝi povas!

Malplenigite de ĉio
 Solecon mi koncentrigas.
 Ne estas la soleco ja timo
 Sed nesekureco, estas.
 En la soleco vi pli sekura estas
 Ol en miloj da socioj.
 La plej mirindaj songoj
 En la soleco estas..

Mi la forgesiĝon serĉas

La liporandojn mi etendas
 Kaj per suĉo la nekonaton kisas,
 Kaj ĝuas la nekonaton, enhavigas
 En etaj potencoj de la burĝonado.
 Vi foriris kaj la floron perdis
 De mia elfontiga koro...
 Mi sentas la forgesiĝon, kisant la karnon
 Per la buŝo terure kara
 De la nekonato, kiu min ne dolorigas
 Kiel la konato.
 Mi agas sen ideoj kaj la stato retenas
 min,
 Mi vidas la figuron fandiĝi, perdiĝi kaj
 identiĝi,
 Anonima, plenpotenca: La universo.
 Kio estas do la potenco, la kono, la
 evidento?
 Ĉiujn mi diserigas en la rideto...

1994

Sereno estas la esprimivo

Sereno estas la esprimivo
 De tiu kiu bruas
 Kiun nur mi aŭdas.
 Kiam vi eklernos senti tiun sonon
 Mi estos aliigita
 En esprimivan serenon

Kiu bruantas
 Kiun aŭdas nur vi kaj kiam
 La aliaj eklernos senti tiun sonon
 Vi estos aliigitaj
 En esprimivan bruantan serenon
 Kiun aŭdas nur...

1994

Elalbanigis



Bardhyl Senimi
 (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Zhou Bangyan (1057-1121)

—laŭ melodio *Aromo en tuta korto*

Oriolidoj kreskas en karesa vento,
 prundrupejoj pligrandiĝas en pluvpelo.
 Arbego ĵetas ombron ĉe tagmeza la momento
 grandege rondan al la tero.
 En la malalta loko apud monto
 la vestoj humidiĝas tre facile,
 oni sekigas ilin per fajrfonto
 je l' kosto de brulligno maltrankvile.
 monedoj nigraj ronde flugas en kvieto,
 sub ponto l' akvo ŝvela
 fluadas lirle per antaŭenĵeto.
 Longlonge staras mi ĉe balustrado fera,
 rigardas al bambuoj kaj fragmitoj,
 jen memorante pri l' boato
 de la poeto ekzilita en meditoj
 pri la popol' kaj ŝtato.

Jar' post jaro la hirundoj are
 flugas for en la aŭtuno,
 venas en printempo ale
 jen por nesti je imuno
 kontraŭ pluv' sub longa la alero.
 Kaj mi ĉiam vagas jen de lok' al loko,
 same kiel tiuj birdoj migras laŭ vetero.
 Do, mi ne plu pensu pri la promoci-allogo,
 sed nur ofte drinku ĝis ebrio

por forgesi la ĉagrenon en la koro.
 Mi, vagant' en sudo, laca kaj kun nostalgio,
 ne toleras plu aŭskulti laŭ memvolo
 al kordinstrumenta la muzik' sonora.
 Nur mi volas, ke la maton kun jad-kapkusen'
 oni sternu por mi jen sen sent' rankora,
 kaj mi dormu pace ĉe l' festen'.

Zhao Ji (1082-1135)

—laŭ melodio *Kiosko sur monto Yan*

En tulo tajlorita el glacio,
 kaj kun malpezaj faldoj kelkaj
 abrikotfloroj estas ja vestitaj kun magio.
 Pudrita vizaĝo per tavolo' de ruĝo
 maldika, delikata kun palruĝa strio,
 elspiras bonodoron kaj parfumon,
 pro kio hontas la palacknabinoj kun envio.
 Facile velkiĝemaj floroj povas ne elteni
 atakojn senkompatajn de defio
 da ventopluvoĵoj tiom!
 Ekstreme trista scen' de agonio!
 Kiom da mizerplenaj noktoj
 ĉi korto spertis en ĝemkrio?

Do, kiu povus komuniki
 ĉi tiujn splenojn tra aer'?

Hirundaj paroj jen flugantaj
 ne konas nian lingvon kun mister'.

Ĉi tie malproksimas, tra la montoj
 kaj fluoj, de l' ĉefurb' de l' regna ter'.

Finfine, kie la palac' sin trovas?
 Min kaptas ofte la sopiro de sufer'.

En songo mi al la palaco iris iam,
 sed tia songo' malofte venas kun esper'.

Tra noktoj mi maldormas
 pro ĝenoj kaj ĉagrenoj en mizer'.

Ye Mengde (1077-1148)

—laŭ melodio *Preludo de akva melodio*

Malfru-aŭtun' alproksimiĝas lante,
 post prujno pompas en prosper'
 krizantemfloroj flavaj.
 Kaban' malalta en aper'
 duonkaŝitas inter floroj.

La vojo antaŭ l' pordo en liber'
 sinuas laŭ oblikva montdeklivo.
 Demandas mi al mi mem kun sever',
 kion mi jam sukcese faris.
 Mi jam pasigis jarojn sen fier'
 ja iele-trapele sen meritoj,
 sed la tempioj jen kovritas per
 blankharoj pretervole.
 Mi paŝas sur bordter'
 de l' lago kun la fono
 de la ĉielo en lazura bel'.

En intaj jaroj mi vagadis
 ja kiel lemno, sub ĉiel'.
 Revene mi balais pure
 la padon en pelmel'.
 Inter bambuoj kaj pinarboj
 troviĝas mia hejmo de tener'.
 Malŝatas mi, ke leviĝas
 de temp' al temp' aŭtuna ventopel'.
 Sovaĝanseroj flugas tra la nuboj
 jen malrapide kun leĝer'.
 De la landlim' alblovas ĉevalhenoj
 kaj tristaj flutosonoj. Jen militafer'
 okazas ree. Kiu povus ja ekstermi
 gandnomrajn malamikojn de l' ribel',
 simile al la generalo, kiu babilante
 komandis trupojn kun tutcerta konsider'?

—laŭ melodio *Belulino Yu*

Falintaj floroj flirtas en ventblovo,
 aldone pluvas ĉe vespero.
 Matene sekvan tagon ja videblas
 en kort' velkinta ruĝo sur la tero.
 Nur araneaj la fadenoj sku-spiralas
 sur la serena blu-ĉielo.

Mano en mano sub florarboj
 intime ni promenas kun sincero.
 Ŝi min invitas al drinkado
 ĝis ebriiĝ' sen ajna konsidero.
 Ne min riproĉu, belulino,
 nek brovojn ja kuntiru kun kolero.
 Mi ebriiĝas jam kiel maso,

mi povas ne reagi al la senttenoro.

—laŭ melodio *Gratulo al novedzo*

Vekiĝinte mi ekaŭdas
 babiladon inter orioloj,
 kaj mi vidas muskon tie kaj ĉi tie
 kuŝi jen malorde en tavoloj,
 kaj kadavrojn sur la tero
 de l' falintaj ruĝaj floroj.
 Furioza vent' forblovas florojn
 de sur branĉoj jen per foloj.
 Nur salikoj nun sin svingas
 en ventblovaj pel-petoloj.
 La zefir' alportas ondojn
 de la eksomeraj varmo-moloj.
 Sur polvokovrita ventumilo
 jen videblas svag-koloroj
 de feinoj lunaj rajde sur feniksoj.
 Tuje la malnovaj kor-doloroj
 kaj ĉagrenoj novaj amasiĝas
 en mi kiel akvoboloj.

Songoj min kunportas
 al la insuleto en rivero,
 kie ondoj verdaj saltas
 leke al lazura la ĉielo,
 ŝajne kiel fermentitaj la vinberoj
 verde bolas en libero.
 Pluv' nebulas fume,
 gutoj flirtas el l' aero.
 Mia sent' senlima ondas
 en akvfluoj kun leĝero.
 Kiu povus pluki lemnofloron
 por adresi mian senton de fidelo?
 Mi nur vane ve-suspiras.
 Kiam trans mil lioj la boat' kun velo
 plenŝarĝitaj je ĉagrenoj miaj
 ja atingos ŝin, pucelo?
 Mi rigardas al la horizonto,
 kie flugas sola la sovaĝansero
 hezitanta antaŭ mont' kaj monto.
 Kiu povus ĉanti kun sincero
 melodion ĉi por liberigi
 min de splena kor-sufero?

elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Jie Xisi (1274 - 1344)

Priskizi anasidojn

Etaj herboj etendiĝas dense,
anasidoj kreskas grandiĝantaj.
Kun lanugaj plumoj elegantaj
ili gakas, gakas, kri-intense.

FROSTA NOKTO

Inter spordaj steloj prujno fridas,
arboj sub flosanta lun' humidas.
Mi sendormas en gastej' silenta,
kaj nun falas folio turmenta.

Wang Mian (1310 - 1359)

Umefloroj tuĉpentritaj

Staras la ume' ĉe la baseno inkuj-lava,
ĉiu floro malfermiĝas pale tuĉpentrita.
Ili ne bezonas laŭdon pri l' koloro rava,
jam sufiĉas en l' aero bonodor' invita.



Xu Yuanjie (1196 - 1246)

Sur la lago

Inter ruĝaj plantaj floroj oriojoj ĥoras,
kaj ardeoj flugas super lag' herboza, milda.
Ĉe vesper' serena ekskursantoj gajhumoras,
plezurboatoj revenas en muziko flirta.

Sa Dula (ĉ. 1272 - 1355)

Vidaĵo en Shangĵing

Bovoj kaj ŝafoj pace paŝtas sin ĉe sunsubiro,
aromas herboj kaj fromaĝo sur la vasta stepo.
Abrupte alruliĝas sabla ŝtormo kirliĝanta,
faligi jurk-kurtenojn nun videblas ĉies strebo.
elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-KVARA

Xu Wugui

§25-05

Prenante kiel sian instruanton la palaco-gardiston Deng Heng, la reĝo Tang lernis de tiu, sed li ne limigis sin je kio estis instruita. Li lernis de sia instruanto lian konformiĝon al la naturo. Li tiel famigis Deng Heng, sed li mem tute ne zorgis pri sia renomo. Rezulte de tio la reĝo Tang kaj Deng Heng ambaŭ akiris belan renomon. Konfuceo fariĝis fama instruisto de la mondo same forgesante sian renomon. Tial la saĝulo Rongcheng diris: "Kiel sen la tagoj ne ekzistus la jaroj, tiel sen la internaĵoj ne ekzistus la eksterajoj."

§25-06

Wei Ying, la reĝo de la regno Wei, sin aliancis kun Tian Mou, la reĝo de la regno Qi. Kiam Tian Mou rompis la aliancon, Wei Ying tiel koleriĝis, ke li intencis sendi murdi lin.

Aŭdinte tion, la ministro de milito Gongsun Yan pensis, ke tio estas honto, kaj diris al la reĝo:

"Kiel la reĝo de granda regno vi eĉ volas fari venĝon ĝuste kiel vulgara homo! Mi petas, ke vi donu al mi ducent mil soldatojn. Mi kondukos ilin ataki la

regnon Qi. Ni kaptos lian popolon kaj forrabos liajn bovojn kaj ĉevalojn, tiel ke de terurigo febro kaj tumoro estiĝos en lia dorso. Ni okupos lian regnon kaj premdevigos la ĉefkomandanton Tian Dan forkuri en paniko. Poste ni vipos lian dorson kaj rompos lian spinon.”

Aŭdinte tion, Jizi pensis, ke ankaŭ tio estas honto, kaj diris al la reĝo:

“Kiam la konstruado de la urbomurego alta je dek *ĵen*-oj preskaŭ finiĝas, oni ĝin detruas, kio estas granda katastrofo por la punlaboruloj. Jam sep jarojn ni ne havas militadon, kio estas la fundamenta virto de la reĝo. Gongsun Yan estas malordo-faranto, kiu alportos malordon al la regno. Vi ne devas lin aŭskulti.”

Aŭdinte tion, Huazi pensis, ke ankaŭ tio estas honto, kaj diris al la reĝo:

“Tiu, kiu konsilas al vi per belaj vortoj ataki la regnon Qi, estas malordo-faranto, kiu alportos malordon al la regno. Tiu, kiu konsilas al vi per belaj vortoj ne ataki la regnon Qi, same estas malordo-faranto, kiu alportos malordon al la regno. Fine tiu, kiu diras, ke ambaŭ estas malordo-farantoj, estas mem malordo-faranto, kiu alportos malordon al la regno.”

“Tiukaze, kion do mi devos fari?” diris la reĝo.

“Vi devos serĉi nenion alian krom la Taŭo,” diris Huazi.

La reĝo perpleksiĝis. Aŭdinte tion, Huizi alkondukis al li Dai Jinren, kiu diris:

“Troviĝas io nomata heliko. Ĉu vi scias pri ĝi?”

“Mi scias,” diris la reĝo.

“Sur la maldekstra korno de la heliko troviĝas regno, kies reganto estas nomata Agreso kaj sur la dekstra de la heliko troviĝas Barbaro,” diris Dai Jinren. “La du regnoj ofte kverelas kaj militas inter si pro la teritorio, kaj la kadavroj de dekmiloj da batalfalintoj kovras la vastan teron, kaj la venkintaj soldatoj devas fari pluan persekutadon dum pli ol duonmonato, antaŭ ol reveni hejmen.”

“Ho,” diris la reĝo, “tio estas falsajo fabrikita, ĉu ne?”

“Mi do pruvos tion por vi,” diris Dai Jinren. “Ĉu vi pensas, ke la spaco, kiu vin ĉirkaŭas, havas limon?”

“La spaco estas senlima,” respondis la reĝo.

“Se vi lasos vian menson vagadi en la senlima spaco kaj poste lasos ĝin reveni en vian regnon, kiu limtuŝiĝas kun la aliaj regnoj, ĉu tiam tiuj regnoj ne ŝajnos al vi apenaŭ ekzistantaj?” demandis Dai Jinren.

“Certe,” respondis la reĝo.

“Inter ĉiuj ĉi tiuj regnoj,” diris Dai Jinren, “troviĝas la regno Wei. En tiu regno troviĝas la ĉefurbo Liang. En la ĉefurbo Liang troviĝas reĝo, kiu estas Via Majesto. Kia do estas la diferenco inter vi kaj la reganto nomata Barbaro?”

“Ne, estas nenia diferenco,” diris la reĝo.

Kiam la Dai Jinren foriris, la reĝo sentis sin ĉagrenita.

Post la foriro de Dai Jinren Huizi envenis kaj vidis la reĝon.

“Tiu ĉi gasto estas homo granda, tiel granda, ke eĉ saĝulo ne estas lia egalulo,” diris la reĝo.

“Kiam oni blovas en bambuan tubon, aŭdiĝas resona fajfo; kiam oni blovas en la truon de pomelo, aŭdiĝas nur malforta siblo. La tuta mondo laŭdas la saĝan reĝon Yao kaj la saĝan reĝon Shun, sed kompare kun Dai Jinren, ili estas ne pli ol malforta siblo.”

§25-07

Vojaĝante al la regno Chu, Konfuceo tranoktis en supovendejo ĉe la piedo de la monto Yiqiu. Sur la tegmento de najbara domo tuj aperis la mastro kaj lia edzino kun siaj geservistoj, por kaŝe rigardi Konfuceon kaj liajn sekvantojn.

“Kion faras tiu grupo da homoj tie?” demandis Zilu, disĉiplo de Konfuceo.

“Ili estas la servantoj de saĝulo,” respondis Konfuceo. “La saĝulo vivas miksiĝe inter la popolanoj kaj kaŝas sin meze de la kampoj. Lia famo malaperis, sed liaj aspiroj restas senlimaj. Eĉ se lia buŝo parolas, lia menso restas silenta. Li agas kontraŭe al la mondaj konvencioj, malvolonte konformigi sin al ili. Li devas esti ermito. Ĉu li estas Shinan Yiliao?”

Zilu petis la permeson inviti lin, sed Konfuceo diris:

“Lasu tion. Li scias, ke mi bone konas lin kaj ke mi estas ĉi tie en la regno Chu. Li certe pensas, ke mi invitos lin en la nomo de la reĝo de la regno Chu. Cetere, li konsideras min kiel homon malican kaj bele-paroleman, kiel do li povus mem veni kaj vidi min.

Por li aŭskulti bele-parolanton ja estas honto, por ne paroli pri la persona vido. Kiel do povus esti, ke li restas ĉi tie por nin atendi?”

Zilu do iris tien por vidi la ermiton kaj trovis, ke la domo jam estas senhoma.



Elĉinigi



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)

Somero malfruas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Nigriĝas

ĉiel'. Strata lum'

kiel lampiroj brilas.

Freŝiĝas nokto. Dum

tago varmas sun!

Aŭdiĝas

ambulanco per

ĝia ulula signo.

Klimato-ŝanĝon sur Ter'

kaŭzas fi veter'.

Aperis

sur ĉielo Lun'.

Ĝi grandas tute plena.

Mire lumigas vin kun

ĝi en via sin'.

Vizito

neatendita

de juna kolombino.

Ĉu ĝi neinvitita

venis vundita?

Kvazaŭ ĝi

dirus: “Homece

vivu homaro.

Vivu ni, pli ĉastece!

Solidarece!

Imputado kaj suferado

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Somero!

Fine, julio

dum freŝeco fridventas.

Verda salut'. Ĉu io

mankas? Jes, ĉio!

Mankas al

ni pli da justec'

en ĉi falsa mondo pro

longdaŭra malverec'

jen, homhumilec'.

Ĉu eblas

viktimon oni

alnomi krimulon ĉar

la domon kaj vivon li

defendis por ni.

Ĉu vere

tre sukcese regu vi

per duoblaj standardoj?

Sojle de miljaro ni

ne kredos al vi!

Ŝanĝiĝos

la mondo. Esper'

restas kiel rimedo,

